

La Riverego

Venu mekarumi en Ŝerbruko !	2	La Idoj de la Suno	19
Miaj trezoroj el Japanio	4	E-biblioteko en Japanio	23
Tri plenaj semajnoj en Oomoto	6	Vojetoj al verda interno	24
UHA en Montrealo	13	Radio-Canada pri Esperanto	25
Kristnaskaj rakontoj	16	E-aranĝoj	26



Tri semajnoj ĉe Oomoto

Trois semaines chez Oomoto



Venu Mekarumi en Ŝerbruko !

Trefleo Mercier

La réunion régionale annuelle MEKARO, qui a lieu chaque année dans une ville différente du Québec ou de l'Ontario, pour la première fois aura lieu à Sherbrooke, du 17 au 19 mai 2014. À ne pas manquer ! www.mekaro.ca

En 2014 MEKARO — Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto — okazos la unuan fojon en la sese plej grava municipo de Kebekio — la urbo Ŝerbruko (Sherbrooke), la 17-an — 19-an de majo.

Ne ekzistas oficiala Esperanto-klubo en tiu urbo, sed kvar esperantistoj kunvenas regule kaj praktikas nian karan lingvon ĉirkaŭ restoracia tablo. Ili nomiĝas Gérald (Ĝeraldo) Côté, Trefflé (Trefleo) Mercier, Bruno Pelletier kaj Ian Wheeler. Kiam Normando Fleury, prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia, proponis al mi organizi iun MEKAROn, mi iom hezitis pro la dato de tiu ĉiujara evento, ĉar ĝi

koincidas kun ĉiujara muzikfestivalo en Ŝerbruko, kiu allogas pli ol dek mil homojn el tuta Kebekio. La loĝspacoj malaperas dum tiu semajnfino, kaj estis riske pensi, ke ni povus loĝigi eĉ malgrandan grupon, kiel la mekaranoj. Sed post kelkaj esploroj, ni fine trovis lokon plej konvenan : ĉe la Universitato Bishop's, kiu permesas rezervi kvarĉambrajn apartamentojn por malgrandaj

eventoj, kiel la nia, eĉ spite al la fakto, ke ĝi gastigas ankaŭ multajn festivalanojn.

Do, estas tiel, ke ni povis strukturi programon kun la certigo, ke estos loĝspaco por ĉiu partoprenanto, kaj en plej agrabla medio. Legu la informon de nia retejo — mekaro.ca — kaj vi konstatos, ke vi havos bonan



Universitato Bishop's



motivon vojaĝi al Ŝerbruco.

La urbo situas en la tiel nomataj Orientaj Kantonoj, proksime de Montrealo kaj Kebeko, sed ankaŭ je modera distanco de Otavo kaj Novanglio. Se sudontarianoj kaj usonanoj el pli longaj distancoj ŝatus profiti de la programo de tiu semajnfino, ni certe helpas ilin laŭbezone. Tiuj, kiuj alvenos aŭtobuse, estos akceptitaj de nia ŝoforo Bruno, kiu plezure kaj senpage veturigos ilin al la universitata loĝejo.

La grava afero ĉi-foje estas rezervi la loĝejon sufiĉe frue por havi la garantion de loĝloko ĉe la Universitato kaj pri ties favora prezo. Vidu la mendilon ĉe la retejo. Alikaze, oni devos mem serĉi loĝadon en la regionaj moteloj kaj hoteloj,

kiuj jam estos okupitaj de la muzikfestivalanoj.

La organizantoj de MEKARO 2014 antaŭvidis programon por ĉiuj veteraj kondiĉoj. Ni sincere esperas, ke sunos kaj ke ni povos montri la naturajn belaĵojn de nia regiono, sed, se pluvos, ni ankaŭ povos fari interesajn aktivecojn ŝirmataj kontraŭ la ĉiela likvaĵo. Vidu la detalojn ĉe la programo-sekcio de nia retejo. La ejo mem de MEKARO-2014 estas interesa por promeni libere ; la kampuso troviĝas kvazaŭ en parko ĉirkaŭata de arboj, floroj kaj verda gazono.

Interesa aktiveco en Ŝerbruco estos la bankedo de la dimanĉa vespero. Fakte estos varma bufedo en belega halo de la Universitato, kie ni povos daŭrigi la vesperon post la manĝo. Estos malfermita trinkejo, kie la partoprenantoj povos mendi trinkaĵojn por la bankedo mem, same kiel por la distra vespero. La bankedon, kiel la loĝadon, oni devas mendi antaŭe per la mendilo. Estos pladoj ankaŭ por la vegetaranoj. Kaj, ĉar temas pri bufedo, oni povos manĝi tiom, kiom permesos la apetito !

Se vi bezonas kroman informojn pri MEKARO-2014, ne hezitu kontakti nin. Ni ŝatus, ke via sperto ĉe ni estu plej memorinda.

Ĝis la 17-a de majo !

Miaj trezoroj

Jenja Amis

Après le long séjour au Japon, notre rédactrice a apporté une valise pleine de souvenirs !



Reveninte hejmen post mia dua vojaĝo al Japanio kaj malpakinte la valizon, mi ordigis miajn « trezorojn ». La trezoroj multas — kaj por povi ĉion meti en la valizon ni eĉ devis prunti unu kroman sakon de nia gastigantino, s-ino Tahira el Kioto (ŝi ŝercis, ke ĉar ŝia nomo estas « Masako », ŝia domo estas plena je diversaj sakoj, kiuj de tempo al tempo vendiĝas en Esperanto-aŭkcioj). Mi devintus jam tion scii, ke dum vojaĝoj la valizoj ne malpeziĝas post la forigo de donacoj, sed, fakte, pli peziĝas pro ĉiuj ricevitaj donacoj kaj aĉetitaj suvenirajoj ! Kvankam la ĉefa kialo de nia longa vizito ne estis turismo, sed universitata esploro de mia edzo, ni tamen sukcesis viziti plurajn urbojn kaj urbetojn de Honŝu kaj Kjuŝu : Tokio, Kioto, Kameoka, Hiroŝimo, Ŝimonoseki, Nagasaki, Dazaifu, Izumo, Kurobe, por nomi nur la lokojn, kie ni pasigis pli ol unu tagon. Kaj jen kion do ni portis ĉi-foje post la dumonata restado en la lando de leviĝanta suno, kiu post iom da tempo komencis sentiĝi kiel hejmo !

Vizitkartojn. Irante al Japanio, oni povas forgesi tutan valizon kaj aĉeti ĉion surloke, sed estas unu afero, kiun oni neniel forgesu : vizitkartojn ! Tion ni lernis tro malfrue dum nia pasintjara tri-semajna vojaĝo al Japanio, sed ĉi-jare ni estis pli saĝaj ! Ni lernis, ke ankaŭ interŝanĝo de nomkartoj en Japanio funkcias preskaŭ kiel rito : oni nepre devas teni la karton per du manoj kaj legi ĝin antaŭ ol formeti en specialan ujon.

Ruĝajn foliojn. Kelkajn mi donacis al mia amiko el Montrealo, kiu demandis, ĉu en Japanio ekzistas ruĝaj folioj. La ruĝaj folioj en Japanio ne nur ekzistas — ilia spektado estas eĉ granda japana nacia sporto. En pluraj lokoj okazas ruĝfoliaj festivaloj, kaj ni eĉ vidis presitajn afiŝojn, kiuj indikis, en kiuj lokoj kaj en kiuj semajnoj la folioj estas ruĝetaj, ruĝaj aŭ ruĝegaj ! Laŭ s-ino Tahira, en la pinta tempo de la ruĝfolia sezono en novembro en Kioto ofte mankas lokoj en hoteloj, kaj vere, en tiu monato apud konataj temploj estis

malfacile trairi pro la konstanta fluo de homoj, multaj vestitaj per belegaj tradiciaj vestaĵoj.

Tegolon. Jes, vi ne mislegis: mi portis la tutan pecon de aŭtentika japana tegolo, kiu pezis mian jam tro plenan valizon je du pliaj kilogramoj. Kial tegolo ? Vizitinte nian amikon Nitta Takamiĉi en Ŝimonoseki, ni manĝis la pladon, kiu nomiĝas « tegolaj nudeloj » — « kaŭara soba », kiun oni tradicie bakis sur tegolo. Eĉ se nun oni bakas tiun pladon sur ferplato kaj uzas tegolon nur por servi la manĝaĵon, ne eblas ne impresiĝi pro la belega aspekto de verdteaj nudeloj sur griza elegante kurba japana tegolo. Nu, pasintfoje mi nomis mian edzon freneza pro lia ideo fotiĝi en japanaj geedziĝaj vestaĵoj, sed ĉi-jare mia edzo reciproka kaj mokete demandas, kial mi ne portis al Kanado la tutan sespersonan kompletan de teler-tegoloj ☺

Librojn. Nu, kompreneble, kiu revenas post studvojaĝo sen plena valizo de novaj libroj ! Al pluraj libroj aĉetitaj ĉe la japana religio Oomoto aldoniĝis ankaŭ donacoj de esperantistoj kaj neesperantistoj : ekzemple, anglikana pastro, kun kiu ni hazarde konatiĝis en Kioto, eksciis, ke mia edzo verkas pri Oomoto, kaj speciale elektis fakrevuojn pri Oomoto ! Inter la donacoj troviĝas ekzemplero de historia revuo de marto 2011 pri

tertreto en Tohoku, kaj kristana biblio kaj himnaro en la japana lingvo.

Krome, ni alportis kvin mil fotojn, aron da paperoj kun muziknotoj (kaj mi ofte zumas lernitajn kantojn Esperante aŭ japane), plenan notlibron, kie mi sensukcese provis noti ĉiujn impresojn (se oni nur povus registri ĉiujn pensojn kaj emociojn kaj povi revidi ĉiun momenton de sia vojaĝo!) kaj sennombrajn aliajn suvenirajn : *Hakata*-pupo (fajenca pupo el la regiono de Fukuoka, antaŭe nomata « Hakata »), origami-rozo, kimono-sako kudrita propramane de unu el niaj gastigantoj, te-tasoj, dolĉa vino el Ŝimane, « ekzotikaj » ŝtrumpetoj kun dividitaj piedfingrumoj (je granda amuziĝo de niaj japanaj akompanantoj), ŝtonetoj trovitaj apud la japana maro ĉe el la urbeto, kie mia edzo laboris du jarojn, kaj multe pli...

Sed la plejparto de niaj memoraĵoj ne eniras la valizon : estas niaj karaj rememoroj pri ĉiuj lokoj, kiujn ni vizitis, kaj ĉiuj personoj, kun kiuj ni renkontiĝis, ĉe kiuj ni gastis, kun kiuj ni babilis, promenis, manĝis, kantis, kaj kiuj tiom malavare donacis al ni sian tempon. Ni estas elkore dankaj al vi ĉiuj, niaj karaj amikoj !



Tri plenaj semajnoj en Oomoto



Ĵenja Amis

Ĵenja et Joel Amis reviennent d'un séjour d'études de trois semaines au centre Oomoto de Kameoka au Japon. Oomoto est le nom d'une religion japonaise, fondée sur le shintoïsme, mais en même temps ouverte à toutes les autres religions, à la fois très japonaise et universaliste. Par exemple, elle prône l'utilisation de l'espéranto comme langue de communication internationale. De nombreux oomotaniens connaissent et utilisent l'espéranto. Ĵenja nous raconte leur séjour là-bas, intense et émouvant.

La menso foje ludas al ni strangajn trukojn : dum mia unua vizito pasintjare ni pasigis en Oomoto nur tri tagojn (eĉ se plenplenajn !), sed tiu vizito por mi ŝajnis multe pli longa ol ĝi vere estis. Ĉi-jare, post la pli ol tri-semajna studa vizito al la Oomoto-Centro en Kameoka, ŝajnas ke la tempo forflugis tro rapide, eĉ se la programo ankaŭ ĉi-foje estis plenplena : studo en arkivoj, farado de intervjuoj, turismo, lernado, instruado, partopreno en festoj, kursoj, diservoj, spektado de tradiciaj japanaj artoj...

La unuan semajnon ni pasigis studante en biblioteko de Oomoto — vera trezorejo, kie konserviĝas ĉiuj revuoj kaj libroj rilataj al Oomoto.

Bonŝance por ni, kiuj ne parolas la japanan lingvon, multaj materialoj ekzistas en Esperanto, angla kaj kelkaj aliaj okcidentaj lingvoj (kiel redaktoro, mi ne povis ne rimarki la bonan kvaliton de la enhavo kaj lingvaĵo de la malnovaj revuoj de Oomoto!). La laborantoj de Oomoto estis ekstreme helpemaj kaj ĉiam helpis elserĉi la bezonatan materialon en arkivoj kaj diversmaniere konsilis. Por doni nur unu etan ekzemplon — en unu doktora verko pri Oomoto ni trovis unu citaĵon, tre rilatan al la esplor-temo de mia edzo. Ni vane provis trovi ĝian originalan fonton kaj por momento ni eĉ pensis, ke la citaĵo eble ne estas ĝusta. Finfine ni komprenis, ke la citaĵo ja estas bona, sed tiu revuo, kie ĝi aperis,

estas ege malnova kaj pro tio ĝi konserviĝas ne en la biblioteko, sed en la konservejo : la konstruaĵo, kiun oni ne kutime vizitas por ordinaraj esploroj kaj kie konserviĝas ne nur la plej malnovaj revuoj kaj libroj, sed ankaŭ diversaj valoraj objektoj ligitaj al la historio de Oomoto. Fakte, la konstruaĵo mem estas trezoro, konstruita speciale por esti perfekta arkivejo : ĝi ne havas fenestrojn, estas fajroimuna kaj tra la jaro konservas la saman temperaturon kaj humidecon. Kutime oni eniras en tiun konstruaĵon nur dufoje jare por purigi kaj aerumi, sed speciale por ni oni faris escepton : oni invitis nin al la konservejo por foti nur unu paĝon de unu malnova revuo !

En la dua semajno ni faris pli ol dekon da longaj intervjuoj kun laborantoj de Oomoto (pluraj en Esperanto, kelkaj angle kaj kelkaj japane pere de lerta Esperanta interpretado fare de s-ro Okuŭaki, kiu ankaŭ diversmaniere helpis al ni dum nia restado en Oomoto). Ni estis ege ĝojaj, ke oni

permesis al ni libere intervui homojn, sen antaŭsciigi la demandojn, tiel ke la intervjuoj ĉiam estis spontanaj kaj liberaj. Tre ofte la laborantoj aldonis « tio ne estas la oficiala respondo, sed mia persona opinio », kio por ni estis aparte ĝojiga, ĉar ni volis ĝuste kompreni la personajn vidpunktojn kaj komprenojn de Oomoto-laborantoj pri la temo de la universitata esploro de mia edzo : kiel oomotanoj harmoniigas ĝiajn naciecajn kaj internaciecajn aspektojn.

Por ni, okcidentanoj, tio ne estas memevidenta, kaj por kelkaj eble eĉ aspektas iomete

kontraŭdira : ja de unu flanko Oomoto estas tre japancentra, kaj de alia — tre malfermite internacieca (pri tio atestas la interreligia agado kaj la uzado kaj subteno de Esperanto). Estis interese ekscii, ke por la plejparto de intervjuitoj tiuj du aspektoj neniel estas en tensio : jen bona ekzemplo de diferencoj inter okcidenta (tiel nomata kartezia) pensado kaj inkluziveca pensado



de japanoj. En la japana socio oni « naskiĝas laŭ ŝintoismo » (ekzemple, oni dediĉas bebon en loka ŝinto-sanktejo), geedziĝas kristane kaj mortas laŭ budhismo, oni diris al ni plurfoje dum nia dumonata restado en Japanio pri la japana emo alpreni, elekti kaj alproprigi certajn trajtojn de diversaj tradicioj. Kaj vere, la japanoj estas majstroj pri asimiligo kaj plibonigo : ne nur rilate al objektoj, sed ankaŭ al religioj. Kaj simile, tiuj du aspektoj de Oomoto por preskaŭ ĉiuj el niaj intervjuitoj aspektis tute naturaj kaj neniel kontraŭdiraj.

Je la fino de ĉiu intervjuo ni demandis la samajn demandojn : « Ĉu vi pensas, ke Oomoto estas universala religio » kaj « ĉu la japanaj aspektoj estas esencaj al



La fama monumento « Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo » en Kameoka



Prezentado de Noo-dramo — unu el praktikindaj tradiciaj artoj ĉe Oomoto

Oomoto », kaj ni alvenis al interesa konkludo : eĉ se ĉiuj intervjuitoj konsentis, ke la esenco de la instruo de Oomoto estas universala kaj malfermita al eksterlando, tamen, la opinioj iom dividiĝis pri la formo mem : tio estas, ĉu Oomoto povus esti praktikata en malsamaj kulturaj kunteksto. Laŭ kelkaj, eĉ se la ideoj de Oomoto estas universalaj, tamen, ĝi estas japana religio, bazita sur ŝintoismo, kaj ĝi devas resti tia. Laŭ aliaj, eĉ se Oomoto naskiĝis en Japanio, tamen, ĝi povus esti praktikata (teorie parolante) ankaŭ ekster Japanio, kun malsamaj ritoj kaj absorbinte lokajn kulturojn kaj bazite sur aliaj liturgiaj bazoj ol ŝintoismo.

Alian interesan malkovron ni faris foliumante kronologie revuojn : oni povas vidi, ke

la rolo de Esperanto en Oomoto, fakte, ŝanĝiĝis kun la tempo : se komence (20-aj — komenco de la 30-aj jaroj) oni aktive varbis por Oomoto per Esperanto, nun Oomoto ne varbas novajn membrojn per Esperanto : ĝi uzas Esperanton ĉefe por gajni subtenantojn kaj simpatiantojn. Ŝajnas al mi, ke Oomoto ne vere varbas eksterlandajn membrojn, ĉu per Esperanto aŭ ne : en la angla versio de la Oomoto-retejo eĉ estas skribite, ke Oomoto ne instigas aliĝon de eksterlandanoj pro kultura kaj lingva malfacileco. Mi trovis tiun vortumon iom forta kaj iusence malkuraĝiga, sed tio certe ne estis la intenco : oni ĝojas, se eksterlandanoj fariĝas oomotanoj, sed simple ĉar Oomoto estas inkluzivisma religio, tio signifas, ke aliĝo al Oomoto ne estas konsiderata necesa por la spirita evoluo de ĉiu persono. La solaj du landoj,



Ofero de manĝaĵoj dum diservo ĉe Oomoto



Tradicia ŝintoisma rito de purigado, per kiu komenciĝas Oomoto-diservo

kie Oomoto tamen varbas novajn membrojn, estas Brazilo (pro la granda japana komunumo) kaj Mongolio (pro tio, ke Onisaburo Deguĉi mem entreprenis grandan misian vojaĝon tra Mongolio) — tamen la kvanto de oomotanoj en tiuj du landoj ankaŭ estas relative malgranda.

Oomoto sufiĉe milde varbas enlande (per fojaj reklamoj en televido kaj radio, okazigo de ekspozicioj, ktp.) kaj ĉefe koncentriĝas sur la familianoj de jamaj oomotanoj por certigi, ke ili restas aktivaj en Oomoto. La kialo por ne varbi aktive eksterlandanojn estas simpla : ĉar ĉiuj bonaj religioj devenas de la sama fonto (laŭ la doktrino de « Bankjo-dokon »), pro tio estas pli bone, se oni praktikas sian originan religion. (Tio tamen ne povas ne starigi la demandon, kia tiu religio estu,

ekzemple, por mi : ĉu kristanismo, kiu estis importita al mia origina mondoparto [Orienta Eŭropo] en la 10-a jarcento, estas mia « origina » religio ? Ĉu paganismo, kiun anstataŭis kristanismo ?..) Tiu nealtrudiĝemo, laŭ mi, estas tre laŭdinda kaj respektinda sinteno, aparte plaĉa al mi persone kaj tute malsama ol la dogmeco de pli ol unu ĉefa monda religio, laŭ kiu tiu religio estas la sola ĝusta vojo, kaj la sola maniero atingi Dion. Fakte, kelkaj okcidentanoj fariĝis oomotanoj ĝuste pro tiu nealtruda sinteno : ekzemple, dum nia restado paro de artistoj el Usono — gesinjoroj Uribe, pasiaj pri ĉiuj japanaj artoj kaj kulturo kaj amikoj de Oomoto dum preskaŭ 40 jaroj — finfine oficiale fariĝis oomotanoj. Sed tamen, de alia flanko, la sekvo de tiu nealtrudiĝema politiko (kompare al aktiva varbado en la frua tempo, kiam Oomoto havis preskaŭ milionon da adeptoj) estas, ke la nombro de oomotanoj ne kreskas — fakte, ĝi, verŝajne, malkreskas, simple ĉar la japana



Oomoto estas konata pro sia interreligia agado (sur la foto: anglikana dekano James Morton, kiu prezidas anglikanan diservon en preĝejo de Oomoto)

socio ĝenerale aĝiĝas kaj malkreskas. Mi ne povis ne konstati, ke antaŭ Oomoto staros la sama granda demando, kiel antaŭ Universala Esperanto-Asocio, Japana Esperanto-Instituto kaj aliaj Esperantaj organizoj : tio estas, kiel trovi novajn kotiz-pagantajn membrojn por daŭrigi la kutimajn servojn kaj aktivaĵojn.

La trian semajnon ni partoprenis en la anglalinvga kurso pri Oomoto por alilandanoj. En nia grupo estis kelkaj kristanaj studentoj el Okcidenta Eŭropo (ĉefe, Germanio), kiuj studas japanajn religiojn en Kioto dum kelkaj monatoj, kaj malnova amikino de Oomoto — esperantistino el Pollando, nun loĝanta en Anglio — Malgoŝa. Ĉiumatene dum tiu semajno ni vere vivis kaj spiris kiel oomotanoj — ni vekigis je la 5:30 kaj, kune kun oomotanoj ; tremante pro malvarmo, ni purigis la templon, partoprenis en matena kaj vespera diservo kaj tage partoprenis la kurson,

elstare gvidatan de s-ro Kimura kaj aliaj Oomoto-laborantoj. Ni havis la ŝancon konatiĝi ankaŭ kun aliaj oomotanoj kaj lerni pri uta-festivalo (kaj eĉ mem ĉanti utaojn), Ĉinkon-meditado, historio de Oomoto kaj Universala Homama Asocio — UHA (kaj ni eĉ inspiriĝis membriĝi en UHA kaj fondi la kanadan sekcion de ĝi!).

La zenito de tiu ĉi kurso estis partopreno en granda Aŭtuna Festo de Oomoto en Ajabe, kun miloj da aliaj partoprenantoj, kaj eĉ la spertado de la aŭtomata skribado fare de la membroj de Tao-Juan : nova religio el Ĉinio (Tajvano) — unua religio, kun kiu Oomoto ekhavis fratecajn rilatojn antaŭ ĝuste naŭdek jaroj. Estis tiom da partoprenantoj en la festo, ke ĉiuj multaj ĉambroj en la sanktejo de Ajabe estis homplenaj, kaj homoj en la ne-ĉefa ĉambro povis nur per televido spekti la riton, kiu okazis en la ĉefa halo.

Dum nia restado ni ankaŭ kun granda ĝojo instruis



Niaj Esperanto-klasanoj kun intereso rigardas japanlingvan libron pri Montrealo

Esperanton, plejparte, prezentante niajn devenlandojn (Ukrainion kaj Usonon) kaj loĝlandon (Kanadon), kaj kantante Esperante, ukraine, france kaj angle. Mi ankaŭ malkovris, ke la japanoj tre ŝatas kanti kaj tre lertas pri kantado. Fakte, ĝuste en Japanio mi remalkovris tiun ĉi

malnovan pasion, kiun mi ne praktikis dum tro longa tempo, partoprenis la ekzercojn de la Oomoto-koruso « Ĉielo » kaj eĉ prezentis kun la korusanoj du kantojn en maljunulejo de Kameoka :

Esperantlingve la alian version de « La Espero » (kiun mi mem pli ŝatas ol la oficialan Esperanto-himnon), kaj japanlingve la belan japanan tradician kanton Furusato, kies vortojn mi

bone parkerigis dum la ekzercoj.

Kompreneble, restante en Oomoto ni ne nur studis kaj instruis — ni ankaŭ turismis kaj ĝuis kafumadon, teumadon kaj babiladon kun laborantoj de Oomoto (kiel mi malkovris, estas ne

nur agrable, sed ankaŭ tre utile, ĉar tie ni renkontis plurajn tre interesajn personojn kaj ankaŭ neformale lernis pri la funkciado de Oomoto).

Al nia adiaŭa festo venis pluraj laborantoj de Oomoto, korusanoj kaj la Esperanto-kursanoj, tiel ke la ĉambro estis tute plena. La bondeziroj de la partoprenintoj estis ege kortuŝaj kaj estis malfacile reteni larmojn... Forirante de Kameoka, en la trajno, mi pensis pri la ĉeno de eventoj, kiuj konatigis min kun Oomoto. Diversaj hazardaj aferoj ligiĝas unu al la alia, kaj, dum tiuj eventoj okazas, ne ĉiam eblas kompreni la kialojn kaj la sekvojn. Estas iom kiel rigardi la pentraĵon de tro proksime : vi vidas detalojn, sed ne la grandan bildon. Mia konatiĝo kun Oomoto estis tia. Mi hazarde lernis Esperanton, hazarde konatiĝis kun mia edzo per Esperanto. Kaj pasintjare s-ro Okuŭaki de la internacia fako de Oomoto hazarde eksciis pri nia restado en Kioto kaj invitis nin al



Oomoto. Dum ni studis en la arkivoj kaj faris la intervjuojn, mi komprenis, ke ĉiuj ĉi eventoj ne estis hazardaj. Eble ne destino, sed ankaŭ ne hazardo. Mi bezonis veni ĉi tien ne nur por helpi al mia edzo pri lia esplorado, sed ankaŭ por mia

persona evoluo. Mi trovis Oomoton kaj ĝian historion fascina, kaj oomotanojn sinceraj kaj bonkoraj. Mi trovis la respondojn al multaj el miaj demandoj, sed

intertempe naskiĝis pli da demandoj, la respondojn al kiuj mi iam esperas trovi. Dum mia adiaŭa vorto mi diris, ke ĉiu persono, kiun mi renkontis, iomete ŝanĝis min persone al pli bona homo, kaj tio ne estas troigo : ja ĉiuj oomotanoj, kiujn ni renkontis, montris al ni tiom da atento kaj zorgemo ! Multaj fariĝis niaj bonaj amikoj, kaj pri kelkaj mi eĉ pensas kiel pri miaj familianoj. Mi kredas, ke mi fariĝis pli bona persono pro tiu ĉi kontakto kun Oomoto-samideanoj, kaj pro tio mi estas eterne dankema !

Universala Homama Asocio : nun en Montrealo !

Joel Amis

Bonega novaĵo, ĉu ne ? Sed... kio estas « Universala Homama Asocio » ? Kaj kial aperas artikolo pri tio en kebekia Esperanta periodaĵo?

Nu, kiel vi, eble, supozis, Universala Homama Asocio (UHA) ja rilatas al Esperanto. Fakte, la fondinto de UHA, Onisaburo Deguĉi, estis la sama persono, kiu enkondukis Esperanton en la religion Oomoto, kies kunfondinto li ankaŭ estis.

Historio kaj ideo

Universala Homama Asocio (kun la originala japana nomo 人類愛善会 *Jinrui Aizenkai*) estis fondita la 9-an de junio 1925 de Onisaburo Deguĉi, kunfondinto de Oomoto, kun la nobla kaj aŭdaca celo strebi por la realigo de mondpaco kaj la feliĉo de la tuta homaro, sen diskriminacio rasa, nacia, religia aŭ kreda. Kvankam ĉiuj oomotanoj aŭtomate membras en UHA, la organizo estas tamen aparta de Oomoto : UHA estas sekulara organizo, kiu bonvenigas ĉiujn bonvolemulojn, sendistinge de religia kredo aŭ filozofia tendenco.



Fundamenta por UHA estas la ideo de *unueco*. Samkiel Oomoto, UHA sekvas la principojn « la mondo estas unu » kaj « ĉiuj religioj originas de la sama fonto ». Ĉi tiuj principoj speguliĝas en la tri tradiciaj grandaj agadkampoj de UHA : interreligia kunlaboro (spirita unuiĝo), internacia kunlaboro / strebo al mondfederalismo (materia / politika unuiĝo) kaj Esperanto (lingva unuiĝo). La principo de unueco ankaŭ esprimiĝas per la emblemo de UHA (vidu apude) : la ruĝa rondo reprezentas la sunon, la blanka reprezentas la teron, la flava reprezentas la lunon, kaj la stelo centre reprezentas homon (ankaŭ Esperanton, ĉar la stelo estas verda !) — kune, do, la unuecon de la universo.

Principoj

- La mondo estas unu, kaj ĉiuj homoj estas nature gefratoj
- Militon kaj perforton oni devas igi neeblaj
- Sociajn malbonojn kaj iliajn kaŭzojn,

ekzemple, avarecon kaj tion ke la malfortaj iĝas predo por la fortaj, oni devas elradikigi

- Ni lernu respekti la tutan homaron kaj vivi en la ĝojo de laboro
- Ni lernu ami la naturon kaj protekti vivon kaj sanon
- Ni respektu ĉiujn indiĝenajn kulturojn kaj strebu al internaciaj interkompreno kaj interŝanĝo
- Ni nin dediĉu al la realigado de la idealo de monda paco, bazita sur kompreno pri la komuna origino de ĉiuj religioj, kaj sur universalaj amo kaj frateco

Montreala filio

Do, kiel ekestis filio de UHA en Montrealo ? Dum mia studrestado en la Oomoto-Centro en Kameoka, Japanio, Ĵenja kaj mi havis la okazon pli profunde konatiĝi kun Oomoto kaj ĝia agado. Mi certe sciis pri la ekzisto de UHA antaŭe, sed ne sciis multon pri ĝia agado, rilato kun Oomoto, ktp. — mi eĉ ne sciis, ke individuoj povas membriĝi. Dum la fakkunsido de UHA okaze de la Japana Esperanto-Kongreso en Tokio d-ro Márkus Gábor



Majo 2011 : UHA helpas al la viktimoj de tertremo en nordorienta Japanio

(Hungario) parolis pri siaj spertoj kun UHA kaj instigis la ĉeestantojn ankaŭ membriĝi. Post iom da tempo ni same membriĝis — kvankam ankoraŭ sen ajna ideo fondi lokan filion de la organizo (nek supozo, ke tio eĉ reale eblas).

Estis nur poste, dum la prezentaĵo pri UHA kadre de la anglalingva kurso pri Oomoto en Kameoka, ke ni konstatis, ke mankas UHA-filio en Kanado (aŭ eĉ en tuta Norda Ameriko)... Ekster Japanio estas UHA-filioj en Brazilo, Mongolio, Barato, Nepalo, Filipinoj kaj pluraj aliaj landoj — sed ne en nia

kontinento. Kompreneble, ĉi tiu frapa manko igis la radojn ektorni en niaj kapoj. Ni do demandis al s-ro Kimura (laboranto de la Internacia Fako de Oomoto, kiu gvidis la prezentaĵon) pri la proceduro por fondi novan filion de UHA. Li respondis, ke oni devas simple kolekti membrojn kaj tiam fari iujn aktivaĵojn, kiuj antaŭenigas la principojn de UHA — ankaŭ Esperanto kalkuliĝas kiel UHA-agadkampo, li aldonis. Ĉu vere tiom simple ?

Post iom da interdiskutado, ni anoncas al s-ro Kimura, ke ni volas fondi filion de UHA en Montrealo.

Videble kontenta, s-ro Kimura diras, ke li portos al ni kelkajn UHA-insignojn por estontaj membroj. Kelkajn horojn poste li alvenas ĉe la pordo de nia ĉambro kun skatolo de insignoj — kvardeko da ! Jen granda laboro farenda !

Kiel do vi povas kunlabori ? Plej baze kaj plej

facile : aliĝu al la montreala filio de UHA ! Ĉiu, kiu subtenas la bazajn ideojn de UHA, povas fariĝi membro. Kaj pro tio, ke nun ne ekzistas alia filio de UHA en Nord-Ameriko, membreco ne estas limigita al montrealanoj : kompreneble kebekianoj, aliaj kanadanoj kaj eĉ usonanoj estas

bonvenaj (almenaŭ ĝis iu fondos filion en Usono) !

Membrokotizo estas donaco de (minimуме) dek 10 \$ (kanadaj) por dumviva membreco. Ĉiu membro ricevos la insignon de UHA.

Due, vi povas kunlabori per partopreno en nia agado. Pro tio, ke nia filio estas nova, la

unua paŝo estas difini la agadon — do, bv. sendi al ni viajn ideojn ! Kiel dirite pli supre, la agado de UHA estas ajna aktivaĵo, kiu antaŭenigas la principojn de UHA.

Por pli da informoj bv. kontakti : yevgeniya.amis (ĉe) gmail.com



Interreligia agado estas grava parto de UHA

Nova eldonaĵo

Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado

Francisko Lorrain

La Société québécoise d'espéranto vient de publier une traduction en espéranto de six contes de Noël de Louis Fréchette, auteur québécois assez progressiste ayant vécu de 1839 à 1908. Soigneusement mise en page, cette édition contient aussi des reproductions des illustrations de l'édition originale de 1899, créées par le grand peintre canadien Frederick Simpson Coburn, ainsi que des cartes géographiques et de nombreuses notes.

Aperis en oktobro, ĉe Esperanto-Societo Kebekia en Montrealo, nova Esperanta libro : *Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado* de Louis Fréchette [lui freŝet], grava 19a-jarcenta kanada verkisto.

Fréchette naskiĝis en 1839 en Levizo (Lévis) kaj mortis en 1908 en Montrealo. Li studis juron en Kebeko, en la Universitato Laval, sed poste dediĉis sin ĉefe al poezio, ĵurnalismo kaj eĉ politiko, fariĝante liberala deputito de Levizo en Otavo. Li tamen publikigis kelkajn prozajn librojn — interalie tiun kristnaskan rakontaron, kies angla versio, de li mem verkita, aperis en 1899 sub la

titolo *Christmas in French Canada* (Toronto, George N. Morang). Jaron poste aperis franca versio de la sama rakontaro, *La Noël au Canada*, ĉe la sama eldonejo. Kelkajn el tiuj rakontoj li verkis originale en la angla kaj poste francigis, kaj la aliajn li verkis france kaj mem angligis. Do li verkis ambaŭ versiojn mem ! Fréchette sufiĉe bone scipovis la anglan, loĝinte en Ĉikago kelkajn jarojn.

Li estis progresema homo, defendante, ekzemple, respublikismajn ideojn, dum Kanado estis parlamenta monarĥio, parto de la brita imperio,

do sub la regado — tiam ne tiel formala, kiel ĝi nun fariĝis — de la brita krono. Li krome kontraŭis la ĉiopotencon de la tiama kebekia klerikaro — tamen estante mem sincera katoliko.

Liaj rakontoj ne celas ĉefe infanojn, sed male homojn el ĉiuj aĝoj. Kelkaj el la rakontoj partoprenas, stile aŭ enhance, en la buŝa popolarakonta tradicio tiam tre disvastigita tra la tuta franca Kanado : ofte, dimanĉe postmese, aŭ dum longaj vintraj vesperoj, kunvenis homoj por aŭskulti rakontiston, lokan aŭ vojaĝantan. La aliaj rakontoj de Fréchette disvolviĝas en kadro pli « moderna » — tamen kompreneble 19a-jarcenta.

Jen elĉerpaĵo el la rakonto *Tom Karibu'*, en kiu Fréchette prezentas la popolan rakontiston Joĉjo Violono.

[...]

Joĉjo Violono estis kurioza tipo de homo, tre interesa kaj populara, kiu pasigis sian junecon en la arbohakejoj, kaj multe ŝatis rakonti siajn vojaĝaventurojn en la

nordaj regionoj, la arbokovritaj lignegoj de la riveroj Otavo, Gatineau kaj Sankta-Maŭrico.

Li estis, tiun tagon, aparte inspirata.


Tiun matenon, li estis oficinta kiel « kunpatro », t.e. baptopatro de novnaskiĝinta etulo ; kaj, ĉar la ceremoniaj akcesoraĵoj iom ŝveligis per dolĉa venteto la velojn de lia natura elokvento, liaj rakontoj mirinde antaŭeniris.

Kompreneble ĉiam temis pri okazaĵoj en hakistejoj kaj arbaroj : pugnaj bataloj, viktimoj, eksterordinaraj fiŝkaptoj, miraklaj ĉasosukcesoj, vizioj, sorĉado, ĉiuspecaj prodaĵoj ; lia kolekto

ampleksis rakontojn por ĉiuj gustoj.

« Bonvolu diri al ni kristnaskan rakonton, Joĉjo, se vi konas tian, por okupi la tempon, ĝis ni ekiros al la preĝejo, » ekkriis junulino nomata Femia Boisvert.

Kaj Joĉjo Violono, kiu fieris scii, kiel



montri respekton al la bela sekso, tuj respondis per la karakteriza formulo ĉi-supre prezentita. Tiam, malsekiginte sian gorĝon per fingrodiko da jamajka rumo, kaj ekfajriginte sian pipon je la kandelo, per unu el tiuj longaj cedraj splitoj antaŭe uzataj de niaj kamparanoj, kaj eĉ post la invento de fosforaj alumetoj, li malfermis sian rakontadon per la sekvaj vortoj :

Mi volas diri al vi, geamikoj, ke, tiun jaron, ni dungigis por flosigi arbotrunkojn super Bytown, ĉe la forko de malgranda rivero nomata La Skabiulino, stranga nomo, sed sen rilato kun tio, kion mi rakontos. [...] (Pp. 79—80)

Unua Esperanta eldono de la libro aperis en 1972, en traduko de la kebekurba esperantisto Vincent Beaupré (1914—1984), kiu multe aktivis, ne nur en la kebeko regiono, sed ankaŭ en Kanada Esperanto-Asocio. Tiu eldono ne estis presita, sed nur tajpita kaj multobligita.



**« Tom Karibu' komencis malsupreniri la arbon »,
F. S. Coburn, 1899**

Iniciatis la projekton reeldoni tiun rakontaron Zdravka Metz el Montrealo, en 2008. Francisko Lorrain, same el Montrealo, funde reviziis la tradukon de Beaupré, kaj poste kontrolis ĝin Bruce Crisp (Otavo), Giorgio Denti (Romo) kaj Trefleo Mercier (Ŝerbruko).

Tiu dua eldono, kiel la unua, enhavas nur la ses plej bonajn rakontojn el la dek du originalaj. La tekston akompanas la elstaraj ilustraĵoj, nigraj-blankaj, de Frederick Simpson Coburn, ciferigitaj el la originalaj eldonoj de 1899 kaj 1900. Coburn estas grava kanada pentristo, konata ankaŭ kiel ilustristo de libroj.

Helpe al nia antaŭvideble internacia legontaro, ni aldonis piednotojn pri ĉiaj temoj — historiaj, geografiaj, kulturaj, lingvaj, religiaj... — kaj mapojn montrantajn la multajn lokojn

menciitajn en la rakontoj.

La libro havas 130 paĝojn kaj kostas 20 dolarojn plus sendokostoj. Por mendi, skribu al francisko.lorrain@mac.com.

Literature

La Idoj de la Suno

Dennis Drown

« Les enfants du soleil » est un roman mystique écrit originellement en espéranto par un de nos membres : Dennis Drown.

Ĉapitro 1

*Estu benata la nomo de Dio de eterne ĝis eterne ;
ĉar al Li apartenas saĝo kaj forto ; Li ŝanĝas la
tempojn kaj jarojn ; Li faligas reĝojn kaj starigas
reĝojn ; Li donas saĝon al la saĝuloj kaj prudenton
al la prudentuloj ; Li malkaŝas la profundaĵon kaj
kaŝitaĵon ; Li scias, kio estas en la mallumo, kaj
lumo estas en Li.*

- Daniel, Ĉapitro 2

Larmo trakuris la vangon de la Diino de la Luno.
Desur malalta nuboj ŝi rigardis al siaj infanoj dum
ili dormis post la rito de ŝia pleneco. Profunde ili



dormis. Delikate kaj malrapide ŝiaj lipoj moviĝis, formis vortojn : « ke la estonteco havu vualon ne tiom trvideblan. » Iom post iom malvarmeta vento blovetis ŝiajn flustrojn tra la vilaĝo. Aŭdiĝis neniu sono tamen, krom tiu de mildaj blovaĵoj tra la dezertaj sabloj.

Se iu povus vidi ŝin, se iu en la tribo vekiĝus por rigardi, tiu scivolus, kiel eblas, ke diino povus esti tiom malĝoja. La larmo trembriletis, kiel likva kristalo, vaganta malrapide malsupren tra ŝia arĝent-blanka haŭto ĝis ŝia longa fingro forviŝis ĝin.

Pluveto ekfalas sur la dormantan vilaĝon.

Se estus rigardanto, tiu vidus ŝiajn longajn nigrajn harojn duone kovrantajn la mamojn de ŝia svelta korpo, kiu ardetis milde desur la nuboj, kie ŝi staris. Tiom bele ŝi aspektis, kaj tiom saĝa en sia malfeliĉo.

Sed neniu rigardis.

Eble estis unu viro en la vilaĝo, kiu povus kapti ekrigardon de Kojoŝa tiun nokton, sed tiu dormis samkiel la aliaj. Lia dormo estis malluma, sensonĝa, kiel ĝi ĉiam estis post la rito de la Plena Luno. Li estis Imigko, la saĝulo de la tribo. Pli malfrue dum la ceremonio li unuiĝis kun Kojoŝa, pleniĝis per ŝia saĝeco kaj vivenergio, kaj disdonis la donacojn de la Diino de la Luno al ŝiaj infanoj dum ili ĉirkaŭdancis la cirklon. La eco de la Luno pasis tra li en la tribanojn, kaj tie en ili ĝi kreskis. La danco fervoris, kaj la energio batigis iliajn korojn. La tribanoj ĉantis, tamburoj pulsas ritme, kaj la energio de la Luno enfluis en la cirklon. Imigko vidis la dian potencon kiel arĝent-blankan lumon. Ĝi venis de la Luno en la ĉielo pli kaj pli rapide en la cirklon ĝis ĝi tiom plenis la tribanojn, ke ĝi ne plu estis retenebla. Tiam Imigko



kriis « Ĉoáa! » kaj la tamburoj ellasis finan tondrecan baton. Ĉiu mano etendiĝis supren al la ĉielo kaj per kriego « Ĉigéh! » de la tribanoj, la energio eksplodis el la cirklo al la Tero, al la tribaj kampoj, al la bestoj en la montaro, kunportante kun ĝi la benon de la Luno kaj la dankojn de la tribo.

Ĉiam post la rito de la Plena Luno, Imigko dormis kiel mortinto. Tiel li dormus dum du tagoj.

Sed la okuloj de la Diino ne falis sur la saĝulon, nek sur la junan knabinon ronkantan mallaŭte en la varma nesto de molaj kovriloj sur la grundo de lia ĥato. Ŝi nomiĝis Anja, kaj ekde morgaŭ ŝi vartos Imigkon dum lia longa dormo kaj prizorgos la ĥaton.

Ne, la rigardo de Kojoŝa falis sur alian junulon en najbara ĥato. Li estis iom pli aĝa ol la knabino, sed ankoraŭ ne plenkreska laŭ la tribaj normoj. « Ĝarelo, » ŝi diris milde, « kiel pace vi dormas. » Ŝi suspiris. « Vi ĉiuj estu trankvilaj. Ke la morgaŭo ne venu. »

Ĝarelo moviĝis en sia sonĝo. La lunlumo eniris la ĥaton per la orienta pordo, falante sur lian nudan

korpon, ĵetante severajn ombrojn sur lian paceman vizaĝon.

La sonĝon li konis, eĉ se poste li reforgesus ĝin. La Suno venis viziti lin. Tiu ne aspektis kiel la Suno tamen, sed kiel maljunulo. Li havis longan grizan barbon kaj sin vestis per blanka robo. Kiam li alvenis al la ĥato de la gepatroj de Ĝarelo, la junulo sciis, ke tiu estas la Suno pro la ora lumo, kiu ĉirkaŭas lian kapon. Strangis iom, ke la dio surhavis blankan robon tian. Laŭ la instruoj de la saĝuloj, Aĥiĉalo montris sin per giganta vizaĝo meze de fajreca suno. Tiu senkorpa vizaĝo vidiĝis aŭ feliĉe aŭ kolere laŭ la humoro de la dio. Ĝarelo supozis, ke la Suno decidis havi korpon nun, ĉar tiel ĉi pli taŭgus por veni viziti lin.

Ĝarelo tre kontentis, ke la dio nun surhavas vizaĝon de la feliĉa Suno. Tiom pace kaj saĝe aspektis lia vizaĝo, ke Ĝarelo havas emon demandi al li pri la plej profundaj sekretoj de la vivo — aŭ tio, aŭ nur rigardi en liajn okulojn fikse dum kelkaj minutoj, aŭ dum kelkaj vivoj.

Tiam subite li ekmemoris la gravecon de ĝentileco



kaj pensis pri la muelita kakao, kiun havis lia familio. Sen permeso de lia patrino, Ĝarelo ne rajtis prepari la spican trinkaĵon de la rara kakao fabo. Tamen vizito de la Dio de la Suno certe meritis escepton. Aĥiĉalo sidiĝis sur maton el kano kaj komfortiĝis tie, dum Ĝarelo preparis la fajron iom ekstere de la okcidenta pordo de la ĥato.

La kakaan pulvoron la familio gardis en angulo de la ĥato sur bretaro el griza ligno, seka kaj splita. Ĝi havis honoran lokon sur la plej alta breto en fajna skatolo farita el nigra, polurita ligno kaj ornamita per arĝento kaj klivetoj de turkiso. Ĝarelo neniam pensis, ke la skatolo eble ŝajnus malkonvena en lia simpla ĥato kun tegmento el pajlo. La spica pulvoro estis speciala. Ĝi estis donaco de la gedioj, kaj tiel meritis laŭeble plej specialan ujon.

Verire, Ĝarelo devus scii, ke li sonĝas, pro tio, ke lia familio neniam havus kesteton tiom valoran, kaj certe ne havus la trinkaĵon de la gedioj kaj reĝoj en sia simpla vilaĝeto. Tamen ĉio ĉi ŝajnis tute natura al li, dum li dormis en la blanka lumo de la Plena Luno. Ĝarelo neniam en sia vivo provis

eĉ guton de la sankta likvo, sed kiam li sidiĝis apud Aĥiĉalo, la Dio de la Suno, li rememoris la spican, amaran guston sekvitan per milda, dolĉeta postgusto tiel, kvazaŭ li trinkus la ruĝan ŝaŭmakvon ĉiutage dum sia juna vivo. Subtilaj gustetoj de kapsiko kaj cinamo ludis sur lia lango. De profunde en lia sonĝo la menso de Ĝarelo ekvojaĝis, serĉante vojon al la praaj tagoj de sia popolo. Li aŭdis voĉojn, la voĉojn de siaj prapatroj. Per softaj flustroj ili vokis al li. Li penis aŭdi, strebis etendi sian menson por aŭskulti tion, kion ili volis diri al li.

Subite Ĝarelo eltiris sin el sia revado kaj rigardis la dion, kiu nun estis trinkanta el sia propra taso. Strangis, ke la dio ne trinketis malrapide la ŝaŭmakvon, kiel kutime faris tribaj saĝuloj kaj gravuloj, kiuj kutime formis la kunularon de reĝoj. Ne, li rapide kaj laŭtege forglutis la tre varman likvon, kvazaŭ li estus trinkinta nenion dum tagoj, kaj, kiam li finis ĝin, li forte kaj klakbrue reĵetis sian tason sur la maton. Tiam li paŭzis, rekvietiĝis, kaj rigardis profunde en la okulojn de Ĝarelo. « Vi estas la ponto, knabo. »

Tiam malaperis la dio.

(daŭrigo sekvos)

Nekrologo

Françoise Dufour (1918-2013)

Mortis s-ino Françoise Dufour en Montrealo, la 12-an de decembro 2013 je la aĝo de 95 jaroj.

Kvarlingva, vojaĝema, laika misiistino en Urugvajo, esperantistino, (laŭdire) unua virino en Kanado, kiu diplomiĝis por povi instrui Esperanton, ŝi havis neordinaran vivon por virino de sia generacio.

Pro tiama ekonomia krizo, 16-jara, ŝi eklaboris kiel kampara instruistino (kaj ŝi faris tiun laboron dum kvin jaroj). El Ontario ŝi translokiĝis al Montrealo, kie ŝi edziniĝis kaj naskis kvar infanojn. Ŝi laboris kiel sekretariino post la morto de sia edzo kaj lernis la hispanan kaj Esperanton. Ŝi ŝatis vojaĝi al kongresoj kaj aktive volontulis en multaj karitataj organizoj.

En 1982 ŝi subtenis kaj partoprenis la fondiĝon de Esperanto-Societo Kebekia. Ŝi ankaŭ longe kaj aktive membris en la Montreala Esperanto-Klubo.

Ni memoros ŝin kiel virino diskreta, respektema kaj vere agrabla.

Normando Fleury

Se Esperanto-libroj forpuŝas vin el via domo...

Jenja Amis

Ĉu vi iam sentis, ke viaj Esperanto-libroj kaj revuoj forpuŝas vin el via domo ?


Jes ? Do, gratulojn : vi estas normala esperantisto !

Sed eĉ senŝerce : ofte ĉe esperantistoj la spaco mankas por ĉiuj libroj, revuoj kaj ĵurnaloj, kiuj amasiĝis tra la jaroj. Plejparte oni ne povas donaci ilin al lokaj grupoj (ĉar tiuj havas nek ejon, nek volontulojn por prizorgi librojn), kaj eĉ landaj asocioj tre zorge elektas, kion ili akceptas. Sed se vi ŝatus donaci parton de viaj trezoroj por regajni iom da spaco en via loĝejo, jen bona novaĵo ! Esperanto-biblioteko en Ŝimonoseki (Japanio) akceptas ne nur librojn, sed ankaŭ revuojn kaj ĉiajn aliajn esperantaĵojn.

« Nun ni kolektas librojn, revuojn, gazetojn, sonbendojn, taglibrojn, pamfletojn, fotojn kaj tiel plu — unuvorte dirite, ĉiaj esperantaĵoj estas bonvenaj, eĉ plej efemeraj paperetoj difektitaj aŭ kriplaj, ĉar spaco por akcepti sufiĉas », diras la fondinto de la biblioteko, s-ro Nitta Takamiĉi. Ni vizitis la bibliotekon ĉi-novembre kaj estis

impresitaj de la enorma ejo kun vicoj da profesiaj bretoj, kiujn la Esperanto-biblioteko sukcesis akiri tute senpage (ĉi-momente la biblioteko havas ĉirkaŭ milon

da libroj, revuoj k.s.). Antaŭe tiun ejon okupis universitata biblioteko, sed la universitato translokiĝis, kaj la konstruaĵo dum iom da tempo restis neuzita. Por utiligi la spacon en 2012 oni starigis societon, kiu kontraktis kun la universitato, en kiu membras ankaŭ Takamiĉi. « Dum longa tempo Esperantujo perdis gravajn heredaĵojn nur pro manko de spaco. Kaj nun problemo estas solvita. La Esperanto-biblioteko en Ŝimonoseki estas establita por malperdi kaj utiligi tiujn heredaĵojn de Esperanto », diras li. La biblioteko en Ŝimonoseki atendas viajn donacojn !



Esperanto-biblioteko en Ŝimonoseki havas sufiĉe da spaco por ĉiaspecaj esperantaĵoj !

JP759-6312, Shimonoseki-shi, Toyoura-cho, Kuroi 1801-4 Nitta Takamichi — Japanio

Vojetoj al verda interno

Steven Brewer



Laŭ la spirito de *Mallarĝa Vojo al Fora Interno*, Vastalto (Japanio) kaj Limako (Usono), kun *Atlatl Studios* (<http://atlatlstudios.com/survoje.html>) proponas kolekti kaj eldoni libron de hajbunoj sub la titolo « Survoje al Esperantujo : Vojetoj al verda interno ». Ni trovas, ke Esperantistoj ofte havas interesajn rakontojn, ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la esperantista vojaĝemo, kaj tiel plu. Kaj hajkamantoj certe vidas diversajn interesaĵojn krom Esperanto en siaj ĉiutagaj vivoj.

La terminon « hajbuno », aŭ « hajka prozo », enkondukis Japano Matsuo Bashō en 1690. Lia majstroverko, « *Oku no Hosomichi* » (« Mallarĝa Vojo al Fora Interno ») temas pri lia vojaĝo al nordaj provincoj kaj estas ankoraŭ konsiderata la pinto de tiu ĉi verkostilo. En hajka prozo oni kombinas prozon kaj poezion, priskribon kaj eseon en impresionisman tuton. Tiu ĉi verkostilo estas, multflanke, simila al la blog-afiŝoj de antaŭaj jarcentoj. En la lastaj jaroj ankaŭ en aliaj landoj kaj aliaj lingvoj oni ekverkas hajbunojn. Ni invitas samideanojn partopreni en tiu ĉi lingva tradicio. Por pli da informoj pri hajbuno, turnu vin al la

wikipedia paĝo : <http://eo.wikipedia.org/wiki/Hajbuno>. Por ekzemplo, jen traduko de konata hajka prozo (hajbuno) de Issa « Mia printempo » (Ora ga haru) : http://atlatlstudios.com/mia_printempo_01.html. Ni invitas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri tiu ĉi temo, bonvole sendu al ni tekston (aŭ tekstojn — vi ja rajtas sendi pli ol unu) antaŭ la limdato de la **1-a de majo 2014**. Ni kolektos manuskriptojn, elektos la plej bonajn, redaktos ilin kaj kompostos libron. Al ĉiu aŭtoro, kies hajbuno(j)n ni akceptos por la libro, ni sendos po tri ekzempleroj de la libro. Kontribuaĵojn oni sendu retroŝte kiel aldonitan dosieron aŭ dokumenton, en kutima formato (.rtf, .txt, .odt, .doc, .docx, aŭ simile) prefere unikode aŭ x-alfabete, al la jena adreso : [survoje \(ĉe\) atlatlstudios.com](http://atlatlstudios.com/survoje(ĉe)).

Vastalto estas HIROTAKA Masaaki, aŭtoro de « Kiel verki hajkon en Esperanto » (2012). Limako estas Steven D. BREWER, aŭtoro de « Poŝtmarkoj el Esperantujo » (2010), « Premitaj Floroj » (2012), kaj « senokulvitre » (2013).

Radio-Canada denove parolas pri Esperanto !

Jen la [video](#) kaj la artikoleto, kiu aperis en la regiona elsendo de Saguenay-Lac-Saint-Jean (france), dank' al aktivado de ESK-ano Tamara Koziej :

Apprendre l'espéranto à Saguenay

De trois à dix millions de personnes parleraient l'espéranto dans le monde, une langue qui n'est officielle dans aucun pays.

Quelques personnes du Saguenay-Lac-Saint-Jean connaissent l'espéranto et veulent maintenant créer une association pour partager leur passion.

La langue existe depuis la fin du 19e siècle. Au départ, elle était utilisée pour faciliter les échanges entre les gens d'origines diverses.

Très simple, l'esperanto ne comporte que 16 règles de grammaire. Son apprentissage est donc aisé et prendrait environ trois mois.

Selon les adeptes, l'espéranto peut être très utile pour les voyageurs, puisqu'il existe un réseau d'accueil international pour les gens qui connaissent cette langue.

Kanada pupo en Monda Pupekspozicio en Higashikagawa

« Ĉi tiu Pupekspozicio estas okazo por lerni pri aliaj kulturoj kaj kreskigi la popolan interkompreniĝon », emfazis dum sia parolado la Ambasadoro de Pollando en Japanio, S-ro Caryl Kozaczewski, dum la Malferma Ceremonio de la 3-a Monda Pupekspozicio, ĉijare dediĉita al Pollando kaj nun okazanta en la urbo Higashikagawa.



La kolekto, farita danke al la helpo de Esperantistoj tra la mondo, kalkulas je pli ol 800 pupoj el 44 landoj kaj portantaj tradiciajn kostumojn. El ili, unu pupo estas kanada kaj ĝi prezentas indiĝenon en tradiciaj kostumoj. La Pupekspozicio estas evento ĉiujare organizata de la Nova Turisma Asocio en la urbo Higashikagawa (Kagawa, Japanio) www.hnt.or.jp (nur japane).

Etsuo Miyoshi, prezidanto de Nova Turisma Asocio

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

Vendredo 10-a de januaro 2014, 18 h*	Commensal (sube)
Vendredo 24-a de januaro 2014, 18 h*	Bretonia manĝo : 3776 Mentana (angule de Roy), metroo Sherbrooke
Vendredo 14-a de februaro 2014, 18 h*	Commensal (sube)
Vendredo 28-a de februaro 2014, 19:30 h	MEDO
Vendredo 14-a de marto 2014, 18 h*	Commensal (sube)
Sabato 29-a de marto 2014	Acerejo apud Tririvero (detaloj en la retejo: esperanto.qc.ca)
Vendredo 11-a de aprilo 2014, 18 h*	Commensal (sube)
Vendredo 25-a de aprilo 2014, 19:30 h	MEDO
Vendredo 9-a de majo 2014, 18 h*	Commensal (sube)
MEKARO: 17-19-a de majo 2014	Ŝerbruco (www.mekaro.ca)
Vendredo 23-a de majo 2014, 19:30 h	MEDO
Vendredo 13-a de junio 2014, 18 h*	Commensal (sube)
Vendredo 27-a de junio 2014, 19:30 h	MEDO
Julio-aŭgusto: ferioj	
Vendredo 12-a de septembro 2014, 18 h*	Commensal (sube)
Vendredo 26-a de septembro 2014, 18 h*	Itala manĝo en MEDO (alportu ion!) kaj jarkunsido de ESK
ARE: 10-13-a de oktobro 2014	Silver Bay, New York
Vendredo 24-a de oktobro 2014, 19:30 h	MEDO

Novembro 14-a : Commensal ; 28-a : MEDO; **decembro** 13-a : jarfina / Zamenhof-festo

* Noto : manĝo je la 18 h , babilado ekde 19:30 h. Por temaj vesperoj kun manĝoj vi povas alporti ion kaj veni je la 18 h aŭ vi povas veni simple por babili je la 19:30 h.

Commensal St-Denis (restaurant végétarien / flexitarien) : 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »). **MEDO (Montreala Esperanto-Domo)** : 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

Esperanto-renkontiĝoj

17-19-a de majo 2014 : 11-a MEKARO

Sherbrooke, Kebekio

30-a de junio — 7-a de julio 2014 : NASK

Viktorio, Kanado

julio 2014 (*detaloj: esperanto-usa.org*) : usona/kanada landa kongreso

Viktorio, Kanado

18-25-a de julio 2014 : 70-a IJK

Fortaleza, Brazilo

26-a de julio — 2-a de aŭgusto 2014: UK

Bonaero, Argentino

16-18-a de majo 2015: 12-a MEKARO

Toronto, Ontario

25-a de Julio — 1-a de aŭgusto 2015 : 100-a UK

Lille, Francio

21-23-a de majo 2016: 13-a MEKARO

Granby, Kebekio

provizore: 15-a MEKARO (2018) : Montrealo (Kebekio)

NASK-2014 en Kanado, kun István Ertl !

Jen la unua fojo en pli ol 40-jara historio de NASK, kiam ĝi venos al Kanado ! Ĝi okazos inter la **30-a de junio kaj 7-a de julio 2014** en belega urbo Viktorio (Brita Kolumbio). La instruistoj estos István Ertl (antaŭa redaktoro de la revuo *Esperanto* kaj profesia tradukisto kaj interpretisto), Usui Hiroyuki (redaktoro de Esperanto-sekcio de *El Popola Ĉinio*) kaj Ĵenja Bondelid (« Helena » el *La Pasporto al la Tuta Mondo*). Tuj poste kaj samloke okazos komuna usona/kanada landa kongreso. Pli da informoj baldaŭ haveblas ĉe esperantic.org (pri NASK) kaj esperanto-usa.org (landa kongreso). Iom da stipendia mono haveblas de ESF (al kiu oni povas donaci por apogi NASK-on, informiĝu ĉe esperantic.org) kaj, por kanadanoj, ankaŭ de la eduka fonduso de KEA (al kiu ankaŭ eblas donaci monon, ekz., por stipendioj al partoprenantoj : informiĝu ĉe [greatrex\(ĉe\)uottawa.ca](http://greatrex(ĉe)uottawa.ca)).

Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafiko : Yevgeniya Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK** : Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Nicolas Viau (konsilanto), Joel Amis (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE** : Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Nicolas Viau (conseiller), Joel Amis (conseiller).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2014.02.20
6358, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca



En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca



Vizitu nian retejon !
Visitez notre site web !
www.esperanto.qc.ca



Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :
www.pasportaservo.org.
Vi povas ankaŭ kontakti
Ĵenja-n Amis
(yevgeniya.amis(ĉe)gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

